

KATALUNA ESPERANTISTO

DUMONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ



MARTO-APRILLO 1931

N-RO 176

KATALUNUJO, LIBERA ŜTATO!

La 14. aprilo 1931, je la 1^a p. t. m., estis proklamata en Barcelono la Kataluna Respubliko, sub prezido de S-ro Francesc Macià.

En la sama tago, kelkajn horojn poste, estis proklamata en Madrido la Respubliko Federacia Hispana, al kiu apartenas federacie la kataluna ŝtato, nun ne plu nomata oficiale respubliko, sed: Generalitat de Catalunya. La unua sekvo estis la oficialigo de la kataluna flago (antaŭe malpermesita eĉ en privataj rondoĵoj) kaj la enkonduko de la kataluna lingvo en la publikaj lernejoj kaj en la Barcelona Universitato.

Nia proksima numero estos dediĉata al la ĝojiga fakto de nia nacia libereco, al la persekutado suferita de la katalunaj esperantistoj dum la sepjara diktatoreco kaj al la raportado pri la lastaj Internaciaj Floraj Ludoj kaj lasta kongreso de Kataluna Esperantista Federacio.

ESTIMATAJ SAMIDEANOJ!

Iam vi intencas aĉeti librojn, aboni al iu ajn gazeto, aliĝi al iu ajn Asocio k. t. p., kaj vi ne scias kien direkti viajn paŝojn. Nu,

IBERIA ESPERANTO-SERVO

provizos vin de gramatikoĵ, vortaroĵ, materialo por kursoĵ—Tabeloĵ por helpi al kursgvidantoĵ. Gramofon-diskoĵ por esperanta instruado.

Pere de ĝi vi povas aboni al tutmondaj esperantaj gazetoĵ kaj aliĝi al plei gravaj Esperanto-Asocioĵ Internaciaĵ kaj Naciaĵ.

Insignoĵ tre diversaj; sigelmankoĵ por propagando; poŝtkartoĵ, paperfolioĵ kun kovertoĵ; esperantaĵoj, k. t. p.

ĈION PRI ESPERANTO PETU DE S-RO FERD. MONTSERRAT, str. Provença, 99, 1.^o, 4.^o, Barcelona (Apud str. Borrell. Aŭtobuso E.)

KATALUNA ESPERANTISTO

ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

ADRESO: Duran i Bas, 8 - BARCELONA

JARABONO:

Enlande: 5 pesetoj
Eksterlande: 6 pesetoj

DIREKTORO:

JAUME GRAU CASAS, L. K.

AŬSKULTU LA VOĈON DE D-RO ZAMENHOF!

Barcelono. En la granda koncertsalono de la mondkonata firmo Odeon. Personoj: Tri pioniroj de la Esp-movado Kataluna. Krome: Barono Engelbrechten, afergvidanto de la firmo, kaj inĝeniero.

Kvazaŭ oni ĉeestus komploton, en la salonon eniras la tri pioniroj. Surtutoj estas levitaj ĝis la kolo, kaj en la manoj ĉiu tenas pakajon: skatolon el ligno havantan en sia interno la plej primitivan instrumenton por reprodukti la homan voĉon. Ĝi estas la unua fonografo inventita de Edison. Ĝin portas s-ro Torres Carreres kun tia zorgo kaj atento, ke oni povus pensi ke ĝi estas pura juvelo. S-ro Gili, prezidanto de Kataluna Federacio, tenas fiere la metalan trumpeton, kiu ebligas aŭdi forte la sonojn elirantajn el la cilindroj, kaj en la du manoj de s-ro Bremón estas la vaksa cilindro, en kiu estas gravurita la voĉo de nia majstro, revivigita relikvo de lia estado en nia urbo.

S-ro Engelbrechten parolas: „Ni faru antaŭe unu provon. Poste ni aŭdos ĝin senpere tian, kia ĝi estas, kaj se ĝi estas taŭga, ni faros la definitivan.“

Oni uzas unue cilindron alian, ne de l' Majstro. Ĝi estas sufiĉe komprenebla. Kaj cetere, ĉiu samideano ja scias, ke la voĉo de Zamenhof estas konservata en antikva primitiva fonografo, kaj ke la transportado al nuntempa gramofondisko estas nebla sen kunesto de bruoj.

Do antaŭen! S-ro Torres zorgas pri la bona funkciado de l' aparato, s-ro Gili ankaŭ atentigas la bonan ruliĝadon de l' instrumento, kaj s-ro Bremón preparas sin por diri kelkajn vortojn,

priskribantaj la parolon de l' Majstro al la cilindroj en la hejmo de s-ro Sabadell, nun loĝanta en Italujo.

Silento. Nenia bruo antaŭ la mikrofono. Oni atendas la eklumiĝon de elektra lampeto, signo konvencia montranta la ekfunkciadon de l' aparato, kiam... ning, nang,... ning, nang,... sonorilo de najbara preĝejo eksonas kaj malpermesas al ni agi. Oni atendas. Fine ĝi ĉesas.

Denova preparo. Atento. Eklumiĝas la lampeto, kaj post tre malmultaj vortoj de s-ro Bremón aŭdebliĝas, kvazaŭ eliranta el transtombo, la mallaŭta voĉo de la Majstro. „En la mondon venis nova sento! Tra la mondo iras forta voko...“. Emocio esprimiĝas sur ĉiu vizaĝo. Jen la Majstro predikanta persone sian evangelion. Jen la kara voĉo, ĉu laŭtiganta kiel en la verso „ne al glavo sangon soifanta“, ĉu konfuziĝanta kun la aparata bruo. — Jen Zamenhof ankoraŭ en prozo. Saluto kiun li faras al la grupo en Barcelono, al kiu li dankas pro la entuziasmo alportita al la 5-a Universala Kongreso...

Ĉesas la ruliĝado post la vortoj „Lazaro Ludoviko Zamenhof“, kiuj finas la cilindron kvazaŭ subskribo.

Fine la voĉo estas konservita! Jam ne plu la esperantistaro devos timi pri perdo aŭ malapero de la voĉo de l' Majstro. Por ĉiam estas gravurita la modelo de la Esperanta prononcado.

Esperantistoj, aŭdu Zamenhofon!

D-ro J. B. M.

(El „Heroldo de Esperanto“)

LA SLOVENOJ KAJ LA PAROLFILMO

Ni slovenoj estas kultura nacio kaj ĝojas pri ĉiu progreso, ankaŭ pri la parolanta filmo. Sed ĉu ni ankaŭ pripensas kiel tiu progreso influas nin el nacia vidpunkto? Mi pensas, ke ne. Ni pripensu do unufoje la rezultatojn de la parolfilmo! Slovenajn parolfilmojn ni ne havos, tio estas sufiĉe klara ankaŭ al la plej granda optimisto. Sed en kiuj lingvoj parolos la filmoj? Nature en la tutmondaj. Ĉe ni estas konsiderinda nur la germana. Francan kaj anglan ni ne konas sufiĉe. Tiuj du lingvoj ne eltenus ĉe ni la konkurencon de la germana. Sed la germana filmo ne nur donos al ni la artajn ideojn, sed ankaŭ la germanajn mondbildojn. Ĉiu fakulo jam estas konvinkita, ke eĉ la raportado baldaŭ okazos per la parolfilmo. Kio estos verdire la parolfilmo por ni slovenoj? Nenio alia ol grava germanigilo. Ĉu estas necese, ke ni kontraŭstaru al la parolfilmo? Ne, tio ankaŭ ne estus ebla, same kiel estas nebla kontraŭstari al la presado. Necese estas konsideri, ke ekzistas ebleco havi parolfilmojn ne nur en la „tutmondaj lingvoj“, sed ankaŭ en neŭtrala helplingvo, kiu estas la sama por ĉiuj nacioj

malgrandaj kaj grandaj. Kiel tiu helplingvo estas konsiderenda nur Esperanto. Kontraŭ la parolanta filmo en Esperanto ne estas eble iom protesti el nacia vidpunkto. Kontraŭe ni devas nur deziri, ke Esperanto havu sukcesojn ĉe la parolfilmo. Tio estas la deziro ne nur de ni slovenoj, sed ankaŭ de ĉiuj malgrandaj nacioj.

(Traduko el slovena ĉiutaga gazeto "Slovenec" — 13. 7. 1930.)

PROJEKTO DE INTERNACIA KONVENCIO.

La n.º 9.—10 (3-Jaro) de "Hispana Esperanto" enhavas artikolon pri iniciato de la grupo "Esperantanaro Fajro" en Barcelono pri la internacia helpa lingvo Esperanto en la Paneŭropa Konfederacio kaj pri Internacia Konvencio por atingi pere de konvenaj pritraktadoj, ke estu adoptata Esperanto kiel nura lingvo en la Konfederaciaj rilatoj ktp.

La nomita grupo invitis la Naciajn Societojn agi por la afero ĉe siaj registaroj. Ĝi mem turnis sin al la hispana ministro.

Ni deziras konstati, ke la nomita grupo neniel estas legitimita por tia iniciato, kiu, se ĝi estas efektiviginda, koncernas unuavice ICK-n kaj enlande la Naciajn Societojn kaj estas farebla nur laŭ centra plano.

La nelegitimita iniciato de E. F. nur povos kaŭzi konfuzon en la preparado por "Interŝtata Akordo" farata de sufiĉe longa tempo de nia komitato en intima kontakto kun la Nac. Societoj. Raporto pri tio estas farita al la Ĝenerala Estraro kaj al la Universala Kongreso. (Komp. cirkuleron Nº 65. 15.6.30.)

Ni neniam antaŭe aŭdis pri la propono de la "Esperantanaro Fajro". Ni jam turnis nin al la naciaj societoj en "KR", Hispana Esperanto-Asocio, Madrid, kaj Kataluna Esperanto-Federacio, Barcelono, por sciiĝi pri detaloj rilate interkonsenton kun la grupo "E. F." La Kataluna Fed. respondis, ke ĝi neniel estis informita pri tiu-ĉi afero.

Nur hazarde ni sciiĝis pri ĉio, ĉar ankaŭ la organon "Hispana Esperanto" spite al pluraj petoj al la eldonanto nia komitato ne ricevas.

Ni do petas la Naciajn Societojn kaj Redakciojn nenion entrepreni pri tiu-ĉi afero por ne kaŭzi damaĝojn al la klopodoj jam faritaj antaŭe kaj daŭrantaj ankoraŭ.

Ni uzas la okazon por peti al la Naciaj Societoj precipe kaj al la ricevantoj de niaj cirkuleroj speciale, zorgi, ke tiaj iniciatoj, se necesaj kaj utilaj, estu farataj nur de la kompetenta institucio. La interesitoj povas por tio disponigi sian helpon.

INTERNACIA CENTRA KOMITATO
de la Esperanto-Movado.

KIE FLIRTAS LA BLANKA-BLUA FLAGO

Oni devas ĝin ami, ĉi tiun landon, ĝiajn arĝente briletantajn montojn, ĝiajn ombrumatajn arbarojn, ĝiajn verdajn valojn kaj ĝiajn malhelajn lagojn, kiujn la ĉielo kovras blanka-blua kvazaŭ festa flago-drapo.

Blanka kaj blua kiel la ĉielo, tiel la bavaraj koloroj.

Sangoplana estas la historio, kiun trapasis Bavarujo dum pli ol mil jaroj. Ŝtormoplenajn tempojn ĝi travivis sendomaĝe, ĉiam denove kreskante el propraj fortoj kaj hodiaŭ ĝi prezentas la duan plej grandan ligoŝtaton de l' Germana Regno kun kelkaj valoraj specialaj rajtoj.

Multgenta estas la popolo de la Bavaroj, sed ĝi estas solidare pensanta popolo. La plej variajn karakterecojn oni trovas je tiu-ĉi popolo. Jen la malfacile incitebla gento de la malnov-Bavaroj kun la kantema buŝo kaj la koro ekipata per sento pri arto, jen la konsiderema, laborema ano de la Supera Palato (Oberpfalz) aliflanke la ruza, lertega ŝvabo, la temperamenta Palatano, la praktika, prudenta kaj fiera Franko. Estas popolo, en kiu kuniĝas konsideremo kaj ardo, entuziasmo kaj pripensemo preskaŭ samamezure.

Ĉu ne la plej grandaj majstroj de la mezepoka arto vivis en la bavaraj urboj Nürnberg (Dürer), Regensburg, Augsburg, München? Ĉu ne en Bamberg altiĝas la plej granda germana Katedralo? Ĉu ne Freising estas la plej malnova episkopa urbo? Ĉu ne Dinkelsbühl, Nürnberg, Rothenburg, Nördlingen estas la plej belaj malnovgermanaj urboj? Ĉu ne Regensburg, la roma Ratisbona, estas bela perlo en la ĉeno de bavaraj urboj? Ĉu ne Bayreuth posedas ĝian festluddomon, Ansbach ĝian Rokoko-kastelon? Kiu povas denombri la trezorojn sin kaŝantajn en tiu-ĉi Bavarujo? Kiu volas nomi la sanktejojn, monaĥejojn, ĉiujn artoplenajn vojkrucifiksojn, kiujn kreis simpla sento, profunde artisteca kaj per kreaj fortoj talentita popolo?

Tia popolo ne estas priskribebla, oni devas kelktempe vivi kun ĝi kaj samatempe ĝui la majestecon de la montoj, la kvieton de la arbaroj, la muĝadon de la alpriveroj. Oni devas ripozi ĉe unu el la belegaj alpolagoj kaj alrigardi la imponajn montojn ĉirkaŭe situantajn por povi kompreni kial Bavarujo estas alloga...

Jenon mi volus havigi al ĉiu: la rigardon, kiam la poŝta aŭtobuso atingas la supron de la Monatshaus a Monto, ankoraŭ kadrumata de malhelaj, sekretoplenaj arbaroj, tiun-ĉi vidon en la valon de *Weilheim*, kie dekstre brilas la *Ammerlago* trans afable salutantaj lokoj, verdejoj, kampoj kaj arbaroj, trans la *Staffel-lago* en la montaron kun ĝia krono la 3 mil metrojn alta *Zugspitze*. Plue la rigardon al *St. Bartholomä* ĉe *Königsee* (reĝa-lago) aŭ la vidon trans la kastelo — digon de *Nürnberg* aŭ boatveturon sur la Da-

nubo de *Weltenburg* al *Kelheim*, aŭ la rigardon de la *Walhalla* aŭ de la *Befreiungshalle* (monumento por memorigi la liberiĝon de l' Napoleona jugo) malsupren en la valon de l' Danubo, duonan tagon en *Passau*, en la *Bavara Arbaro*, en la *Fichtel-Montaro*, en la *Franka Juro*, restadon sur la *Käppele de Würzburg*, migradon tra *Rothenburg* — tion mi dezirus al vi.

Jen Bavarujo. Jen la Bavaroj, la popolo, kiu elkreskis el tiu-ĉi ĉirkaŭo, el la miljara historio de ĉi-tiu riĉa benata lando, la popolo, kiu en senzorgo kaj korboneco evoluas tion, kion ĝi heredis, el kio ĝi devenis kaj kion ĝi amas de sia tuta koro: la hejmujojn protektatan de la blanka-blua flago.

Kaj tia popolo kaj tia lando atendas vin, geamikojn, por gastigi vin. Venu, karaj samideanoj, kaj vidu propraokule la belecojn de nia ĉarma Bavarujo.

Venu, vi estos kore akceptataj.

A. RADECKER

BONAJ NOVAĜOJ EL KATALUNUJO.

Kun granda ĝojo ni eksciis, ke "Kataluna Esperantisto", organo de la "Kataluna Esperantista Federacio" kaj de la "Internaciaj Floraj Ludoj", reaperis: la malnova, la vera "Kataluna Esperantisto" en sia tradicia formo! La direktoro estas Jaume Grau Casas, L. K., la fama esperanta ampoeto kaj kompilinto de la impona "Kataluna Antologio".

Sub lia gvido "Kataluna Esperantisto" kreskos kaj florados kaj-ni tion almenaŭ esperas-baldaŭ povos kiel iam iĝi monata, anstataŭ dumonata kiel nun. La abonprezo estas 6 pesetoj por la eksterlando, la adreso: Duran i Bas, 8, Barcelona.

Kun "Kataluna Esperantisto", kun "Kataluna Esperantista Federacio" reviviĝis la "Internaciaj Floraj Ludoj"; ili okazos en 1931 kun la Kataluna kongreso en Granollers. Jen bona novaĝo por la esperantaj plumkavaliroj!

Kaj ne jam estas ĉio! La dua eldono de la "Kataluna Antologio" nun estas presata en 1500 ekzempleroj. Pri tiu antologio, kiun ĉiu literaturamanto devas posedi, ni aliokaze reparolos.

Nun ni antaŭ ĉio deziras esprimi al niaj Katalunaj Samideanoj nian varman simpatian por ilia afero, por ilia luktado, kiu tiel ege similas nian.

Niaj vojoj certe iam kaj ie kuntuŝiĝos: ni tiam staros apud ili kun la samaj idealoj, kun la samaj postuloj, kun la sama fido je nia bona rajto!

Vivu niaj Katalunaj Samideanoj kaj ilia patrolando!

(El "Flandra Esperantisto".)

LA ELSORĈIĜO, de Pierre Loti.

(Fino.)

Sed, ne, pripensinte tion, ŝi ja ne malsupreniros, ĉar ĉiam estas ebla renkonto kun eŭnukoj, servistinoj, ĉiuj kun la konvena rideto al la edziniĝonta, kaj ŝi vidus sin devigata, antaŭ ili, elmontri ravigitan mienon, ĉar la etiketo tion postulas en similaj okazoj. Kaj, poste, la incitado konstati tiujn festpreparojn, tiujn tablojn aranĝitajn sub la branĉoj, tiujn belajn tapiŝojn disĵetitajn sur la planko...

Tiam, ŝi rifuĝis en saloneto, apud sia ĉambro, kie ŝi havis sian pianon Erard. La muzikon decis ankaŭ adiaŭi, ĉar piano ne troviĝos en ŝia nova domo. La patrino de la juna bejo, — 1320-ulino (1), kiel la maljunajn sinjorinojn alnomas la floretoj de intensa kulturo burĝonintaj en la moderna Turkujo, — pura 1320-ulino, estis ne sen malfido, permesinta la bibliotekon de novaj libroj en okcidenta lingvo, kaj la revuojn kun bildoj; sed la piano videble ofendis ŝin, kaj ne plu oni kuraĝis insisti. (Ŝi estis veninta plurfoje, tiu maljuna sinjorino, fari viziton al la fianĉino, surŝutante ŝin per dorlotajoj, per elmodiĝintaj komplimentoj kiuj incitis ŝin, kaj observante ŝin ĉiam kun daŭra atento, por pli bone poste priskribi ŝin al sia filo.) Do, ne plu da piano, en ŝia morgaŭa hejmo, tio, en la kontraŭa flanko, trans la golfo, en la koro mem de la malnova Stambul. Sur la klavaro ŝiaj manetoj nervaj, rapidaj kaj cetere mirinde spertaj kaj lertaj, ekimprovizis unue konfuzajn kaj strangajn aferojn, sencele, kun akompano de subitaj krakoj, kiam la tro grandaj ringoj tuŝis la bemolojn aŭ la diesojn. Kaj, poste, ŝi forprenis la ringojn, kaj, post meditado, ekludis tre malfacilan Wagneran transskribon de Liszt, tiam, iom post iom ŝi ĉesis esti tiu al kiu edziĝos morgaŭ la kapitano Hamdi-Bey, Adjutanto de Lia Imperiestra Moŝto; ŝi estis la fianĉino de juna militisto kun longa hararo, loĝanta en kastelo sur montosupro, en la malheleco de la nuboj, super tragedia riverego; ŝi aŭdis la simfonion de la malnovaj legendaj tempoj, en la profundaj Nordaj Arbaroj...

Sed kiam ŝi ĉesis ludi, kiam ĉio estingiĝis kun la lastaj vibradoj de la kordoj, ŝi rimarkis la sunradiojn, jam ruĝajn, kiuj eniris preskaŭ horizontale tra la eternaj fenestrokradoj. Tio estis ja la fino de tiu tago, kaj la timo resti sola en tiu lasta vespero, — kiel tamen ŝi deziris, — subite ŝin kaptis. Tuj ŝi alkuris al sia avino, peti permeson kiun ŝi atingis, kaj rapide ŝi skribis al siaj kuzinoj, petante kvazaŭ malespere ke ili venu spite ĉio akom-

(1) Tiel nomita persono kiu akceptas nur la datojn de la heĝiro, anstataŭ uzi la eŭropan kalendaron.

pani ŝin; — sed nur ili ambaŭ, Zeyneb kaj Melek, ne la ceteraj honorakompanantinoj loĝigataj en ilia ĉambro; nur ili ambaŭ, Zeyneb kaj Melek, ŝiaj preferataj amikinoj, ŝiaj konfidenciulinoj, ŝiaj animfratinoj. Ŝi timis ke ilia patrino ne permesos tion, pro la ĉeesto de la aliaj invititoj; ŝi timis ke la horo ne estu tro malfrua, la suno tro malalta, ĉar la turkaj virinoj ne plu eliras kiam ĝi kuŝiĝis. Kaj, de sia kradumita fenestro, ŝi rigardis la maljunan Izmaelon kiu kuradis alporti la leteron.

De kelkaj tagoj, eĉ al siaj kuzinoj kiuj suferis de tio, ŝi mutiĝis pri la gravaj aferoj, ŝi estis fermita kaj preskaŭ fieraj; eĉ al tiuj ŝi kaŝis la honton de sia suferado, sed nun ŝi jam plu ne povis; ŝi deziris ilin por ploradi sur iliaj ŝultroj.

Kiel ĝi rapide malleviĝis, tiu suno de la lasta vespero! Ĉu ili havos la tempon alveni? Super la strato, por pli malproksimen rigardi, ŝi klinis sin tiel longe kiel tion permesis la kradoj kaj la lignaj vergetoj. Ĝi estis nun "la purpura horo de la batalvesperoj", kiel ŝi diriĝ en sia infana ĵurnalo, kaj revoj de forkuro, de klara ribelo puŝis ŝian nebrideblan kaj ĉarman kapeton... Kaj, tamen, kia serena senmoveco, kia fatalista kaj rezigna kvieteco, ĉirkau ŝi! Parfumo de aromaĵoj suprenvenis el tiu granda funebra bosko, tiel trankvila antaŭ ŝiaj fenestroj, — parfumo de la malnova neŝanĝebla turka tero, parfumo de la malalta herbo kaj de la plantetoj kiuj de la mateno varmiĝis pro la aprila suno. La malhelaj verdaĵoj el la arboj, kontrastantaj antaŭ la ardanta krepusko, estis kvazaŭ trafendataj, kvazaŭ traborataj de la lumo kaj radioj. Malnovaj orumaĵoj briladis tie ĉi kaj tie, sur la pinto de tiuj tompostonoj, hazarde displantitaj en vasta spaco, maldense dissemataj sub la cipresoj. (En Turkujo, oni ne timas la mortintojn, oni ne apartigas sin de ili; en la koro mem de la urboj, ĉie oni lasas ilin dormi). Tra tiuj melankoliaĵoj de la unuaj planoj, inter tiuj faskoj de malhela foliaro kiuj tenis sin starantaj kvazaŭ turoj, en la intervaloj de ĉio ĉi, aperis la malproksimaĵoj, la granda senkompara dekoracio: tuta Stambul kaj ĝia golfo, en la plena fajro de la puraj vesperoj. Malsupre, tute malsupre, la akvo de la Ora Korno, al kiu deklivis tiuj proksimaj tombejoj, estis ruĝa, ardanta kiel la ĉielo; centoj da boatoj fendis ĝin, — centjara svarmo, post la fermo de la bazaroj, — sed de tiel alte oni aŭdis nek la murmuron de ilia sulkaĵo, nek la penadon de iliaj remistoj; ili aspektis kvazaŭ longaj insektoj, vicirantaj sur spegulo. Kaj la kontraŭa bordo, tiu bordo de Stambul, okulvideble ŝanĝiĝis; ĉiuj domoj apud la maro, ĉiuj malsupraj etaĝoj de la mirinda amaso, ĵus estingiĝis kaj kvazaŭ malaperis, sub tiu eterna violkolora nebulo, kiu konsistas el akvovaporo kaj fumo; Stambul ŝanĝiĝis kvazaŭ trompiluzio; nenio plu distingiĝis, nek la ruiniĝo, nek la mizero, nek la malbeleco de kelkaj modernaj konstruaĵoj; nun ĝi estis nur silueto, el ore striata malhela violkoloro, kolosa urbotranĉaĵo tute plena de pintu-

roj kaj kupoloj, starigita, kvazaŭ ekrano, por maski la brulegon de la ĉielo. Kaj la samaj voĉoj, kiel matene, la klaraj voĉoj, la ĉielaj voĉoj rekantis liberaere, alvokante la fidelajn Osmanliojn al la kvara tagdiservo: *la suno kuŝiĝis*.

Tiam la malliberulineto, malgraŭ si mem iom kvietigita tamen per tiom da paco, des pli maltrankviliĝis pri Melek kaj Zeyneb. Ĉu ili sukcesos atingi ŝin, malgraŭ la malfrua horo?... Pli atente ŝi rigardis la ekstremon de tiu vojo, kiun borderis ĉe unu flanko la malnovaj kradumitaj domoj, ĉe la alia rava regno de la mortintoj...

Ha! ili venis!... Ili estis, tie, tiuj malgrandaj nigraj fantomoj sen vizaĝoj, elirintaj el malgaja pordego, kaj rapidantaj kun eskorto de du negroj kun longaj sabroj... Tre rapide decidiĝintaj, tre rapide pretaj, la malfeliĉaj fraŭlinetoj!... Kaj tial ke ŝi rekonis ilin, alkurantajn al ŝia malespera alvoko, ŝi sentis siajn okulojn malheliĝi; larmoj, sed tiun ĉi fojon dolĉaj larmoj, fluis sur ŝiaj vangoj.

Kiam ili eniris, relevante siajn malgajajn vualojn, la edziniĝonta sin ĵetis plorante al iliaj brakoj.

Ambaŭ premis ŝin kontraŭ siajn junajn korojn kun plej granda kompatato:

—Ni ja ne dubis ke vi ne estas feliĉa... Sed vi nenion volis diri al ni... Paroli al vi, ni ne kuraĝis... De kelkaj tagoj ni trovis vin tiel sinkaŝema kontraŭ ni, tiel malvarma.

—Nu! vi ja bone scias kiel mi estas... Estas malsaĝe, mi hontas ke oni vidu min suferi.

Kaj ŝi ploris nun singulte.

—Sed kial vi ne diris "ne", mia kara?

—Ha, jam tiom da fojoj mi diris "ne"!... Ĝi estas tro longa, ŝajne, la listo de tiuj kiujn mi jam rifuzis!... Kaj, ankoraŭ, pensu nur: dudek-du jaroj, mi estas preskaŭ maljuna fraŭlino... Krom tio, ĉu tiun aŭ alian akcepti, ne gravas, ĉar ĉiam mi fine devos al iu edziniĝi.

Antaŭe, ŝi aŭdis amikinojn ŝiajn tiel paroli, la antaŭtagon de sia edziniĝo; ilia pasiveco malplaĉis al ŝi, kaj jen ŝi finiĝis tute same... "Ĉar li ne estos tiu, kiun mi elektus kaj amus, diris unu, negrave ĉu li nomiĝas Mehmed aŭ Ahmed! Ĉu mi ne havos infanojn por konsoli min kontraŭ lia ĉeesto?" Alia, tre juna, kiu akceptis la unuan pretendanton, senkulpigis sin per tiuj vortoj: "Kial ne la unuan anstataŭ la sekvantan, kiun mi cetere ne pli multe konos?... Kion diri por lin rifuzi?... Kaj, ankoraŭ poste, kia raportado, nu do pensu, mia kara!"... Ha, ne, la apatio de tiuj fraŭlinoj ŝajnis al ŝi ja nekomprenbla: lasi sin edziniĝi kvazaŭ sklavinoj! Kaj jen ŝi mem ĵus konsentis al simila marĉandado, kaj morgaŭ estos la terura tago de la pagdato. Pro laceco ĉiam rifuzi, ĉiam batali, ŝi, kiel la ceteraj, fine diris tiun *jes* kiu perdis ŝin, anstataŭ la *ne* kiu savus ŝin, almenaŭ por iom da tempo an-

korau. Kaj nun, tro malfrue, por sin repreni, ŝi atingis jam la bordon de la abismo: morgaŭ!...

Nun ili kune ploris, ĉiuj tri; ili ploris la larmojn kiujn dum tagoj retenis la fiereco de la edziniĝonta; ili ploris la larmojn de la granda disiĝo, kvazaŭ unu el ili estus mortonta...

Melek kaj Zeyneb, kompreneble, ne reiros tiun ĉi vesperon hejmen, sed ili kuŝos tie ĉi, ĉe sia kuzino, kiel kutime estas kiam oni vizitadas unu la alian, antaŭ la nokto, kaj kiel ili konstante faris de deko da jaroj. Ĉiam kune, la tri fraŭlinoj, kvazaŭ nedisigeblaj fratinoj, ili kutimis plej ofte dormi en kuneco, ĉe unu aŭ ĉe alia, kaj precipe tie ĉi, ĉe la Cirkaziano.

Sed, tiun ĉi fojon, kiam la sklavinoj, eĉ ne petinte ordonojn, ĵus sternis sur la tapiŝoj la silkajn matracojn por la gastoj, ĉiuj tri, sole restintaj, havis la senton kunveni por funebra vespero. Ili petis kaj atingis la permeson ne malsupreniri por altabliĝo, kaj senbarba negro, kun vizaĝo de tro grasa makako, ĵus alportis al ili, sur orarĝenta pleto, iom da manĝaĵo kiun ili tute ne volis tuŝi.

Malsupre, en la manĝoĉambro, ilia komuna avino, la paŝao, patro de la edziniĝonta, kaj fraŭlino Bonneau de Saint-Miron, vespermanĝis sen interparolado, kun silento de katastrofo. La avino, pli ol iam ofendata de la sinteno de la filino de sia filino, sciis ja kiun kulpigi, ŝi kulpigis la novan edukadon kaj la instruistinojn: ŝi ja amis ŝin, tiun etulinon, naskitan el ŝia sango de senmakula mahometano, kaj poste fariĝinta kvazaŭ erarinta filo de kiu oni eĉ ne esperis la revenon al la heredataj tradicioj, sed ŝi kredis ĉiam sia devo montri sin severa, kaj hodiaŭ antaŭ tiu nekomprenebla, silenta kontraŭstaro, ŝi volis ankoraŭ pliakrigi la malvarmon kaj severecon. Koncerne la paŝaon, li kiu ĉiam kontentigis kaj dorlotis ŝian solan infanon kvazaŭ sultaninon el la *Mil kaj Unu Noktoj*, kaj interŝanĝe ricevis tiel dolĉan amemon, li ne pli bone komprenis ol ŝia bopatrino 1320-ulino, kaj li kolieris ankaŭ; ne, jam tro granda, tiu lasta kaprico; ŝajnigi sin martiro, ĉar, la tempo veninta doni al ŝi mastron, oni elektis al ŝi belan junulon, riĉan, el granda familio, kaj en favoro apud Lia Imperiestra Moŝto!... Kaj fine la malfeliĉa instruistino, kiu almenaŭ sentis sin tute senkulpa koncerne tiun edziĝon, kiu ĉiam estis la konfidenciulino kaj la amikino, silente kaj dolore miris; ĉar ŝia tiel kara lernantino revenigis ŝin en la domon por la edziniĝo, kial ŝi ne deziris ŝian akompanon, tie supre, en sia ĉambro, por la lasta vespero?...

Sed ne; la tri fantaziulinoj, — ne kredante tamen tiel suferigi ŝin, deziris resti solaj, la antaŭvesperon de tiu disiĝo.

Por ĉiam finitaj iliaj vesperkunvenoj por nur ili tri, en tiu ĉi ĉambro morgaŭ nelogota, kaj kiun oni devis adiaŭi... Por ke ĝi ne estu tiel malgaja, ili ekbruligis ĉiujn kandelojn el la kandelingo, kaj la grandan kolonlampon, — kies lumŝirmilo, laŭ modo

ankoraŭ nova en tiu jaro, estis pli larĝa ol sunombrelo kaj farita el florpetaloj. Kaj ili reviziadis, kolektis aŭ kelkafoje detruis mil amatajn objektojn, de ili longe gardatajn kiel tre karaj rememoraĵoj. Ili estis garbetoj el oraj aŭ arĝentaj fadenoj, kiuj kutime ornamas la harojn de la edziniĝantaj, kaj kiujn la honorakompanantinoj poste konservas ĝis kiam ilia vico venas; da ili troviĝis tie kaj tie ĉi, brilantaj, alkroĉitaj per rubandoj al la vitrofrontonoj, al la blankaj muroj de la ĉambro, kaj ili elvokis la belajn kaj palajn vizaĝojn de suferantaj aŭ mortintaj amikinoj. Ili estis, en ŝranko, pupoj iam karese amataj; rompitaĵoj ludiloj, velkintaj floroj, malfeliĉaj relikvoj de ilia infaneco, de ilia unua juneco kune pasigita, inter la muroj de tiu malnova domo. Ankaŭ troviĝis tie, en kadroj preskaŭ ĉiuj pentritaj aŭ broditaj de ili mem, fotografiaĵoj de junaj virinoj el la ambasadoroj, aŭ de junaj mahometaninoj en *vesperboj* kiujn oni facile kredus elegantaj Parizaninoj, sen la skribaĵeto en arabaj literoj malsupre skizita; penso aŭ dediĉaĵo. Fine troviĝis ankoraŭ humilaj luksaĵetoj, gajnitaj en la antaŭaj vintroj en tiuj bonfaraj lotoj organizataj de la turkaj virinoj dum la vesperoj de la Rhamazan; ili havis neniom da valoro, tiuj, sed ili rememorigis pri pasintaj momentoj de tiu vivo, kies senrevena forpaso naskis la plej grandan maltrankvilon... koncerne la edziĝdonaĵojn, el kiuj kelkaj tre luksaj kaj kiujn fraŭlino Esther Bonneau aranĝis ekspozicie en apuda salono, ili sentis sin tute indiferentaj.

Apenaŭ finita la melankolia revizio, oni aŭdis ankoraŭ, super la domo, resoni la belajn klarajn voĉojn: ili vokis la fidelulojn al la kvina preĝo de la tago.

Tiam la fraŭlinoj por pli bone ilin aŭdi, eksidiĝis antaŭ malfermita fenestro, kaj tie enspiris la mildan freŝecon de la nokto, odoranta je cipresoj, aromaĵoj kaj marakvo. Malfermita ilia fenestro, sed kradumita, kompreneble, kaj krom ĝiaj feraj stangoj, ŝirmata per la eternaj lignaj vergetoj sen kiuj neniu turka virino rajtas eksteren rigardi. La aeraj voĉoj kantadis ankoraŭ ĉirkaŭe, kaj, el malproksime, aliaj kvazaŭ respondis, granda kvanto da aliaj voĉoj malsuprenvenis el la altaj minaretoj de Stambul kaj traflugis la dormantan golfon, portataj de la sonorado de la maro; oni dirus eĉ ke en la ĉielo mem okazas, tiu subita vibrado de puraj voĉoj vin vokantaj, laŭ facila melodio venanta el ĉiuj lokoj samtempe.

Sed tio nelonge daŭris; kiam ĉiuj muezimoj jam disverŝis, al kvar direktoj, la religian frazon el senmemora tradicio, subite sekvis granda silento. Stambul nun, trans la intervaloj de la tute proksimaj kaj tute nigraj cipresoj, blue kontrastis antaŭ la ĉielo penetrita de malpreciza lunhelo, iu nebuleca Stambul, Stambul pligrandigata ankoraŭ kun tute gigantaj kupoloj, kaj ĝia centjara silueto, ne ŝanĝebla, estis punktita de sennombraj fajroj re-

brilantaj sur la akvo de la golfo. Ili admiris, la fraŭlinoj, tra la mil rombetoj de la malliberigantaj lignaĵoj; ili demandis al si ĉu tiuj famaj urboj el Okcidento (kiujn ili konis nur per bildoj kaj kiujn ili neniam vidis ĉar la mahometaninoj ne havas la rajton eliri el Turkujo) ĉu Vieno, Parizo, Londono povis doni similan impreson de beleco kaj grandeco. Okazis ankaŭ ke ili ŝovis la fingrojn ekstere, tra la kradotruoj, kiel la malliberulinoj ŝatas fari, kaj freneza envio pelis ilin vojaĝi, koni la mondon, — aŭ nur unu fojon promenadi, en bela kiel la nuna nokto, en la stratoj de Konstantinopolo, — aŭ nur iri ĝis tiu tombejo, sub ilia fenestro... Sed, vespere, mahometano tute ne rajtas eliri...

La silento, la absoluta silento, grade vindadis la malnovan kvartalon de Khassim — Pacha, kun fermitaj domoj. Ĉiu rigidiĝis ĉirkaŭ ili. La murmuro de Pera — kun nokta vivado kiel en la eŭropaj urboj, — estingiĝis jam antaŭ ol atingi tien ĉi. Kaj koncerne la akrajn voĉojn de tiuj vaporŝipoj, kiuj svarmas tie malsupre en la Pointe-du-Serail, oni liberiĝis de ili jam antaŭ la horo de la kvina preĝo, ĉar la ŝipmovado en la Bosforo haltas krepuske. En tiu orienta kvieteco, kiun tute ne konas niaj urboj, sola bruo de tempo al tempo aŭdiĝis, bruo karakteriza de la noktoj en Konstantinopolo, bruo simila al neniu alia, kaj kiun la Turkoj el antaŭaj jarcentoj konis jam tute saman: tak, tak, tak, tak! sur la malnovaj pavimoj; iun tak, tak pli gravan pro la funebra sonoro de la stratoj kie jam neniu pasas. Tio estis la kvartala noktgardisto, kiu dum sia longa promenado kun pantofloj, frapis la ŝtonojn per sia peza ferbastono. Kaj en la malproksimo aliaj noktgardistoj same respondis kaj tio ripetiĝis de unu strato al alia, tra la tuta grandega urbego, de Eyoub al Sept-Tours, kaj, laŭlonge de la Bosforo, de la Marmara al la Nigra Maro, por diri al la loĝantoj: "Dormu, dormadu, ni estas tie, ni, viglaj la okuloj ĝis mateno, spionante la rabistojn aŭ la bruliĝon".

La fraŭlinoj, momente, forgesis ke tiu vespero estis la lasta. Kiel okazas en la antaŭtago de grandaj vivoŝanĝoj, ili lasis sin allogi per la kvieteco de la aĵoj jam delonge konataj: en tiu ĉi ĉambro ĉio restis en sia loko kaj kun sia ĉiama aspekto... Sed la subitaj rememoroj baldaŭ suferigis ilin: morgaŭ, la disiĝo, la fino de ilia intimeco de fratinoj, la ruiniĝo de tuta ilia kara pasinteco!

Ho! tiu morgaŭ por la edziniĝanta!... Tutan tagon por ludi komedion, kiel la kutimo ordonas, kaj ludi ĝin bone, volenevole! Tutan tagon por rideti kvazaŭ idolo, rideti al dekduoj da amikinoj, rideti al tiuj sennombraj scivolulinoj kiuj okaze de grandaj edziĝoj, invadas la domojn. Kaj oni devos trovi afablajn vortojn, akcepti plezure la bondezirojn; de mateno ĝis vespero montri al ĉiuj tre feliĉan mienon: fiksi ĝin sur la lipoj, en la rigardo, malgraŭ la kolero kaj la teruro... Ho! jes, ŝi tamen ridetos! Ŝia fie-

reco nepre postulis tion: aperi tie kvazaŭ venkito, estus tro humilige por ŝi, la nesubigita, kiu tiel vantis sin ke ŝi nur memvole pariĝos, kiu tiom predikis al aliaj la provirinan bataladon... Sed super kiu ironia kaj kruela tago la suno leviĝos morgaŭ!... "Kaj se nur ankoraŭ, ŝi diris, tio finiĝus post krepusko... Sed ne, poste venos la monatoj, la jaroj, la tuta vivo, por esti posedata, piedpremata, fuŝata de tiu nekonata mastro! Ho! pensi ke neniu el miaj tagoj, nek iu el miaj noktoj apartenos plu al mi, kaj nur tial ke tiu ĉi viro havis la kapricon edziĝi al la filino de Kortega Marŝalo!"...

La kuzinoj ĝentilaj kaj dolĉaj, vidante ŝin nervoskue piedfrapi, petis kiel ŝanĝon, ke oni ludu muzikon, por sola kaj lasta fojo... Tiam ili kune turnis sin al la buduaro kie la piano restis malfermita. Tie, granda amaso da objektoj metitaj sur la tabloj, sur la antaŭtabletoj, la tapiŝoj, kaj kiuj perfidis la animstaton de la modernaj mahometaninoj, tiel avidaj ĉion elprovi, en sia enŝlosiĝo, ĉion posedi, ĉion koni. Troviĝis tie eĉ fonografo (la plej perfekta el tiu jaro), per kiu ili amuziĝis dum kelkaj tagoj, lernante la murmuradon de okcidenta teatro, la bagatelaĵojn de opereto, la malsaĝaĵojn de kafkoncertejoj. Sed, al tiuj malsamdevenaj luksaĵoj, ili ligis neniun rememoron; kie la hazardo ilin lasis, ili restos kvazaŭ forĵetindaĵoj, por pli granda ĝojo de eŭnukoj kaj servistinoj.

La fianĉino, sidanta antaŭ la piano, unue hezitis, poste ekludis "Koncerton" de ŝi mem komponitan. Lerninte de bonegaj instruistoj la harmonion, ŝi havis inspirojn de neniu fremda devenantajn, ofte iom sovaĝajn kaj preskaŭ ĉiam belegajn; kiel rememorojn, oni trovis, eble nur mallonge, tiun de la galopado de la cirkaziaj rajdantoj en ŝia enlanda stepo; sed neniun alian. Ŝi daŭrigis per "Nokturno" ankoraŭ ne elfinita, datanta de la antaŭa vespero; ĝi komenciĝis per ia malgaja ventego, kiun tamen fine pacigis kaj superregis la paco de la apudaj tombejoj. Kaj bruo el ekstere de tempo al tempo miksiĝis al ŝia muziko, tiu bruo tiel propra al Konstantinopolo: en la kvazaŭ tomba strata sonorado, la bastonfrapoj de la noktgardisto.

Zeyneb tuj alproksimiĝis por kantado, akompanata de sia juna fratino Melek; kiel preskaŭ ĉiuj turkaj virinoj, ŝi havis varman voĉon, iom tragedian, kaj kiun ŝi vibrigis kun pasio, precipe en ĝiaj belaj malaltaj notoj. Post hezitado ankaŭ en elektado, kaj post senefika malordigo de muzikmeblo, ŝi malfermis partituron de Gluck kaj belege ekkantis tiujn senmortajn malbenojn: "Dioj de la Stikso, ministroj de la Mortoj!"

La prauloj, kuŝantaj en la kontraŭaj tombejoj, tiuj prauloj el la malnova Turkujo ripozantaj inter la radikoj de la cipresoj, sendube tre longe miris pri tiu fenestro tiel malfrue ankoraŭ lumigita kaj verŝanta en la mezon de ilia malhela loĝejo sian lums-

trekon: harema fenestro sendube, pro la krado, sed el kiu elŝoviĝis melodioj por ili ja strangaj...

Tamen Zeyneb apenaŭ finis la belegan frazon: "Mi ne alvos ja vian kruelan kompaton", kiam la pli malgranda akompanantino haltis, konsternita, frapante falsan akordon... Homa figuro, kiun ŝi la unua ekvidis, ĵus stariĝis antaŭ la piano; figuro granda kaj malgrasa kun malhelaj vestoj, aperinta senbrue kiel aperas la fantomoj!...

Tio ne estis ja dio el la Stikso, ne, sed ĝi ne estis io pli bona: preskaŭ "kif-kif", laŭ la esprimo kiu amuzis tiun malgrandan Melek kun flaveruĝaj haroj. Tio estis sinjorino Husnugul, la teruro de la hejmo: "Via avino, diris ŝi, ordonas al vi kuŝiĝi kaj estingi la lumon". Kaj ŝi forŝovis sin senbrue kiel ŝi estis veninta, lasante ilin tri tute frostaj. Ŝi havis talenton por alveni ĉiam kaj ĉien neaŭdite; tio estas ja pli facila ol aliloke en la haremoj, ĉar la pordojn neniam oni ŝlosas.

Malnova cirkazia sklavino — sinjorino Husnugul (Beleco de rozo), kiu, antaŭ tridek jaroj, preskaŭ fariĝis familiano, naskinte infanon de bofrato de la paŝao. La infano mortis, kaj oni edzinigis ŝin al intendanto, en la kamparo. La intendanto mortis, kaj iun tagon ŝi reaperis, por vizito, alportante grandan kvanton da vestaĉoj en lanaj sakoj laŭ malnova modo. Nu, tiu "vizito" daŭris jam de preskaŭ dudek-kvin jaroj. Sinjorino Husnugul, duone observanto kaj spiono de la junulinoj, fariĝis la dekstra brako de la maljuna dommastrino; cetere tre bone edukita, ŝi faris je sia propra konto vizitojn al la najbaraj sinjorinoj; ŝi estis akceptata, tiel indulgema kaj egaliga ĉiu estas en Turkujo, eĉ en la plej riĉa mondo. Multaj familioj en Konstantinopolo havas tiel en sia hejmo ian sinjorinon Husnugul, — aŭ Gulchinasse (Rozservistino); aŭ Chemsigul (Suna rozo), aŭ Purkemal (La perfekta), aŭ io alia simila, — kiu ĉiam estas pesto. Sed la maljunaj sinjorinoj 1320 ŝatas la servojn de tiuj guvernistinoj kiuj sekvas la fraŭlinojn en la promenadoj, kaj poste reveninte ili faras sian raporteton.

Nediskutebla estis la ordono sendita per sinjorino Husnugul. La tri malĝojigitaj fraŭlinoj silente fermis la pianon kaj blovestingis la kandelojn.

Sed, antaŭ ol kuŝiĝi, ili sin ĵetis en la brakojn unu al alia, por adiaŭi sin; ili ploris al si reciproke, kvazaŭ tiu morgaŭa tago disigos ilin por eterne. Pro timo al reapero de sinjorino Husnugul, kiu certe troviĝis aŭskultanta malantaŭ la neŝlosita pordo, ili tute ne kuraĝis paroli; dormi ili ne povis ankaŭ, kaj de tempo al tempo oni aŭdis sopiron, aŭ singulton, elpuŝiĝi el unu el tiuj junaj brustoj.

La fianĉino, meze de tiu profunda nokta silento, favora al la klarvido de la korpremo, konsterniĝis pli kaj pli sentante ke ĉiu horo, ĉiu minuto alproksimigis ŝin al la neevitebla humiligo,

al la fina malfeliĉego. Ŝi malestimis lin nun, kun sia barbara impulsemo, tiun fremdulon, kies vizaĝon ŝi apenaŭ ekvidis, sed kiu morgaŭ havos ĉiujn rajtojn super ŝia persono kaj por ĉiam. Ĉar nenio estas ankoraŭ plenumita, venis al ŝi pli forta tento provi kiun ajn plej lastan klopodon por elŝteliĝi el li, eĉ ĉion riskante... Sed kio?... Kies homan helpon ŝi povis atendi? Kiu do ŝin kompatus?... Ĵeti sin al la piedoj de la patro, tro malfrue, ŝi ne plu cedigos lin... Baldaŭ noktomezo; la luno sendis sian spektran lumon en la ĉambron; ĝiaj radioj penetris, desegnante sur la murblankecon la senkompatan kradaĵon de la fenestroj. Ili lumigis ankaŭ, super la kapo de la princineto, tiun verseton de la Korano kiu ĉiu mahometanino devas havi super sia lito, kiu sekvas ŝin de la infaneco kaj kiu estas kvazaŭ kontinua preĝo protektanta ŝian vivon; ŝia verseto estis, sur velura emirverda fundo, malnova kaj admirinda orbrodaĵo, desegnita de fama kaligrafo el malnova tempo, kaj ĝi diris tiun frazon tiel dolĉan kiel tiuj de la Evangelio: "Miaj pekoj estas grandaj kiel la maro, sed via pardono pli granda ankoraŭ, ho Allah!" Kvankam jam de longe la fraŭlino ĉesis kredi, la sankta skribaĵo, gardisto de ŝia dormo, efikadis sur ŝia animo, kaj nedifinita konfido restis en ŝi al iu supera boneco, al iu supera pardono. Sed nun ĉio estis finita; nek antaŭ, nek post la morto, ŝi plu esperis kompaton, eĉ malgrandan: ne, sola en suferado, sola por defendi sin, kaj sole respondi!... En tiu momento, do, ŝi sentis sin preta al ekstremaj decidoj.

Sed, ankoraŭ, kion fari, kion?... Forkuri? Sed kiel, kaj kien?... Noktomeze, forkuri sencele, tra la timigaj stratoj?... Kaj ĉe kiu renkonti rifuĝejon por eviti reprenon?...

Zeyneb, tamen, kiu ankaŭ tute ne dormis, parolis tre mallaŭte. Ŝi ĵus memoris ke oni estis ja en tago de la semajno nomata de la turkoj Bazar-Gumi (respondanta al nia dimanĉo) kaj kiam oni devas vespere preĝi por la mortintoj, tiel kiel ankaŭ en la vespero de la Tcharbembé (kiu respondas al nia ĵaŭdo). Nu, ili neniam ĉesis plenumi tiun devon, ĝi estis eĉ unu el la solaj religiaj kutimoj de la Islamo kiujn ili fidele observis ankoraŭ; por la cetero, ili estis kiel la plej multaj mahometaninoj el ilia tempo kaj mondo, tuŝitaj kaj velkigitaj de la blovo de Darwin, de Schopenhauer kaj aliaj. Kaj ilia avino ofte diris al ili: "Tre malgaje en mia maljuneco, estas vidi ke vi fariĝis pli malbonaj ol se vi estus konvertiĝintaj al la kristanismo, ĉar fine, Dio amas ĉiujn kiuj havas religion. Sed vi, vi estas tiuj veraj *malfideloj* kies tempon tiel saĝe la Profeto antaŭdiris". Malfidelaj ili ja estis, skeptikaj kaj malesperantaj multe pli ol la meznombro da nialandaj fraŭlinoj. Sed, tamen, preĝi por la mortintoj restis por ili devo al kiu ili ne povus manki, kaj cetere tre dolĉa devo; eĉ dum iliaj somerpromenadoj, en tiuj vilaĝoj de la Bosforo, kiuj havas belegajn tombejojn, sub la ombro de la cipresoj kaj kverkoj, okaze ili haltis kaj preĝis, super malfeliĉa nekonata tombo.

Do, ili senbrue rebruligis tre diskretan noktolampeton; la fianĉineto prenis sian Koranon, kuŝantan sur murtableto, apud ŝia novarta lito (tiu Korano ĉiam volvita per silkaĵo el la Meko kaj santale parfumita, kiun ĉiu mahometanino devas havi apud sia lito, precipe por tiuj preĝoj, kiujn oni preĝas nokte), kaj ĉiuj tri mallaŭte ekpreĝis, kun progresanta kvietiĝo; la preĝado iom post iom pacigis ilin kiel la freŝa akvo kvietigas la febron.

Sed baldaŭ alta malhele vestita virino, alveninta kiel ĉiam sen bruo de paŝoj, sen bruo de malfermita pordo, kvazaŭ fantome, stariĝis apud ili:

—Via avino ordonas estingi la noktolampon...

—Tre bone, sinjorino Husnugul. Se tio plaĉas al vi, estingu ĝin vi mem, ĉar ni estas kuŝantaj, kaj havu la bonecon klarigi al nia avino ke ni tute ne intencis malobei ŝin: sed ni preĝis la preĝojn por mortintoj...

Baldaŭ estis la dua horo de la nokto. Jam estingita la lampeto, la tri fraŭlinoj, lacigite de emocioj, de bedaŭroj kaj koleroj, dormiĝis samtempe, per bona trankvila dormo, kiel tiu de la kondamnitaj en la antaŭvespero de la lasta mateno.

Trad. el la franca: MARIAN SOLÀ, L. K.

(Premiita de la "Internaciaj Floraj Ludoj".)

KORESPONDADO.

Fidia Cesarini, del de UEA en Potenza, Italujo.—S-ro Dalmau transdonis al ni vian p. k. Se vi vere ne konas katalunan lingvon, plej malfacile estas ankoraŭ interpreti ĝin el legendoj kaj popolrakontoj. S-ro Ferd. Montserrat, Provença 99, Barcelona, vendos al vi ĉiuspecajn gramatikojn kaj vortarojn pri la kataluna lingvo.

Giov. Ponti, Via Aurelio, 1-6, Sampierdarena-Genova, Italujo.—Ni penas trovi zorganton pri via produkto "Manna".

Géza Berki, Debrecen (Kir. Tábla) Hungarujo.—Kvankam multe interesas nin ĉio rilata al popolkutimoj, superstiĉoj, ktp, ni donas al vi adreson de unu el la plej kleraj folkloristoj en Katalunujo kaj iama Prezidanto de KEF. Lia adreso: S-ro Joan Amades, Peu de la Creu 15, Barcelona. Ni rekomendas al vi la libreton "La Kataluna Popolkanto", prilaboritan de S-roj Joan Amades kaj Jaume Grau Casas. Ĝia kosto: 1 peseto, aŭfrankite. Vi povas aĉeti ĝin ĉe ni mem.

P. Tarnow, Galkhansen b. Langenfeld, Rejn. (Germanujo).—Ni supozas, ke vi jam ricevis nian p. k. kaj ekz. de "L'Esperantista Català".

F. Curtó Basté, Barcelona. Vi pagis nur kotizon al KEF, kaj mankas, ke vi pagu abonon al KE.

BIBLIOGRAFIO.

KRISTANISMO KAJ PATRIOTISMO, de L. N. Tostoj, trad. I. Maĉernis. Biblioteko de "Sennaciulo", serio: Literatura, n-ro 12-13. Eldono de "Sennacieca Asocio Tutmonda", Paris-Leipzig, 1931. Libreto 112-paĝa, 12 × 15 cm., klare presita, kun tre bona traduko de tiu fama verko per kiu la granda rusa verkisto vipis, laŭ ni, la *maljustan naciismon*, sed ne la patriotismon. Ni estas sinceraj pacifistoj, opinias iun ajn mortigon krimo, ĉu ĝi estas farata de persono, de tribunalo aŭ de armeo, sed ni ne kredas ke vera patriotismo estas kulpa je la malbonoj, kiujn oni aljuĝas al ĝi. En hispana lingvo oni nuancas inter *patriotismo* kaj *patrioterismo*; la unua estas tute respektinda kaj per tiu ĉi lasta oni ne volas aludi precize la fiagojn de *troa* naciemo, sed eĉ nur la simplan esprimon *per tro ardaĵ vortoj* de cetere tre pravigebla patriotismo. Ni partoprenas la sentojn de Tolstoj, estas veraj internaciistoj, supernaciistoj, sed ne malŝatas, en ilia ĝusta kaj justa signifo, la vortojn *patriotismo* kaj *nacio*. Eble temas tie ĉi nur pri malsama koncepto de unuj kaj aliaj antaŭ la simpla vorto: patrujamo. En lasta okazo, ni ne precizigas ĉu la ujo de niaj patrioj ampleksas nian urbon (antikva koncepto), nian landon (nuntempa sento) aŭ la tutan mondon (morgaŭa espero).

J. G. C.

ENLANDA MOVADO.

Monistrol de Montserrat.—Esperanta propagando organizita de la grupo de Monistrol de Montserrat, okazinta en la teatra salono de la societo "Ateneu Obrer Monistrolenc", sidejo de la grupo, disvolviĝis laŭ la sekvanta programo: La estraro de la societo Ateneu kaj partoprenantoj en la propagando prezidis la feston. S-ro Pere Estatuet prezentis la oratorojn kaj parolis pri la organizo de la grupo. S-ro Miquel Martí deklamis esperantan poezion. S-ro Salvador Marcet, prezidanto de la esperanta grupo "Aplec", el Sabadell, paroladis longe pri la neceseco kaj utileco de la zamenhofa lingvo. Pastro Fidel Orobitg en sia parolado, komparis Esperanton al la semado de kampo, rimarkante la neceson resterki ĝin; ĉar ne estas sufiĉa la semado, necesas sterkado por ke la semo kresku kaj produkti abundajn fruktojn. S-ro Jaume Oller fermis la kunvenon kaj anoncis samtempe ke dancado de sardanoj tuj komenciĝos.—Estis feliĉa ideo de la organizintoj anonci dancadon de sardanoj luditaj de orkestro je la fino de la programo, ĉar ĝi certe altiris tiom da personoj el ĉiuj aĝoj, ke la granda salono restis tute plena. Bela okazo por propagandi Esperanton.—*Delfi.*

Literatura Mondo

La plej bona Esperanto-revuo, redaktata de la hungaraj
samideanoj

Kolomano Kalocsay kaj Julio Baghy

Kunlaboro de la plej eminentaj esperantistoj.

Luksa monata gazeto, grandformata, pri

Literaturo kaj Arto

kun abundaj gravuroj.

Adreso: Redakcio kaj Administracio:

S-ro Kolomano Kalocsay

Szentkirályi-utca 3. 1.

BUDAPEST VIII - (Hungarujo)

Abonebla: S-ro Jaume Grau Casas

Diputació, 50 - BARCELONA

JARABONO POR IBERIO: 18 PESETOJ

Pro senlaboreco, kataluna samideano estas devigata vendi sian esperantan bibliotekon, je tre favoraj prezoj. Petu detalojn de nia Redakcio.

Ankau eksterlandaj samideanoj povos pagi *en pesetoj*. Do ili profitos el la malalta hispana valuto.

KATALUNA

ANTOLOGIO

DUA ELDONO

VERKO REKOMPENCITA DE LA
"ESPERANTISTA AKADEMIO"

Aperos: 1 Junio 1931

416 p.: 16 × 22 cm.

PREZO: 10 PESETOJ

Se oni mendas de la Kompilinto:

S-ro JAUME GRAU CASAS

Diputació, 50 - BARCELONA

oni ne devas pagi sendkostojn. Rabato en vendado de
kelkaj ekzempleroj.